

H. M. C. L. L.



# LA RONDO

*The Australian Esperanto Monthly*

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 10s (ink. membrecon de A.E.A.) Anoncoj: Tri linioj—18p.

Redaktoro: F. R. Banham, Kasisto:

2 Banchory St.,  
Essendon, W.5,  
Victoria.

E. McKenzie,  
117 Mitchell-st.,  
N.16, Vic.

A.E.A. adreso:

Box 2122T,  
Elizabeth-st.,  
Melbourne.

Vol. 8, N-ro 38.

MELBURNO.

OKTOBRO, 1950.

## THE WHY'S OF FOREIGN LANGUAGE TEACHING.

An Australia-wide conference of modern-language teachers was recently held at the Melbourne University. Learned papers were read and expert opinions propounded by specialists on the "how's" of language teaching in secondary and higher schools, and the conference achieved some noteworthy results.

The occasion, important in the history of Australian pedagogy, brings to our mind the other serious question concerning language education, namely, the "why's" of it.

It is a question that calls for critical thinking by the citizen, the student and his parent, as well as the educationist.

Why do we teach foreign languages?

The late Professor Bloomfield writes in his monumental work, "Language":

"For the sake of what is called cultural tradition or continuity, some part of the population ought to be familiar with ancient languages, especially Latin and Greek. For the sake of contact with other nations, and especially to keep up with technologic and scientific progress, a fairly large body of persons must understand modern foreign languages." This, of course, is a rational view with which we must agree. The important point is, however: Should foreign-language education be compulsory to all or nearly all who attend secondary schools?

The answer to the question can only be a conditional affirmative: Yes,

if a student can be enabled to master the subject as easily as he can be taught some other subject, say, mathematics.

This condition, however, is far from being fulfilled at present and is not likely to be in any foreseeable future. The time allotted to foreign-language teaching in schools is too little. The number of qualified teachers—teachers who can actually teach a class—is far too small. The pupils too often regard foreign language as a necessary evil, to be studied only for the sake of passing examinations. As Dr. Bloomfield points out, "The large part of the work of high schools that has been devoted to foreign-language study includes an appalling waste of effort: not one pupil in a hundred learns to speak and understand, or even to read a foreign language." In the four years' Latin course in high schools, "scarcely any of the teachers have a reading knowledge of Latin." The standard of modern foreign-language teaching is a little higher, but here, too, "the results are scarcely good enough to counter a movement for abolishing the instruction."

The language teachers then are impelled to improve their methods in order to counter such a movement.

But can they, under the prevailing system of education? Have they thoroughly considered the psychological process with which a person learns his mother tongue? Have they asked themselves seriously how many thousands of hours a child spends in order to be able to talk, read and write simple sentences in the lan-

guage into which he was born and with which he is brought up?

It seems to us that if they thought these questions through to their logical conclusions, they would call, not merely for improved methods of instruction, but for a complete overhaul of the curriculum to permit of a totally intensive course of instruction in which at least a year or two of the pupil's time is devoted exclusively and uninterruptedly to foreign-language education, for, as trained linguists and psychologists have discovered, that is the only practical way in which a pupil may be enabled to learn the subject with any degree of success.

We feel, however, that the aim of modern-language teaching, that of fulfilling the need for cultural contact with other nations, could be achieved far more satisfactorily if instruction in the International Language were to be given to all or nearly all who attend schools and specific foreign languages reserved for those with particular qualification and inclination, for the International Language can be mastered by anyone with an IQ of 100 or even less without an intensive programme of teaching, and it is the most effective inter-language bridge ever discovered for those who are to take up foreign languages. (S.J.O.)

#### DIFINOJ.

**BELADONO:** Itale, bela virino; angle, mortiga veneno. Frapa ekzemplo de la esenca idento de la du lingvoj.

**BIGAMIO:** Eraro de bongusto, por kio en la socio estonta la saĝeco aljuĝos punon nomatan trigamio.

**DIPLOMATIO:** La arto patriota, mensogi por la propra patrujo.

**DORSO:** De via amiko tiu korp parto, kiun vi rajtas vide primediti dum via malbonfortuno.

**GEEDZECO:** Stato aŭ kondiĉo konsistanta el mastro, mastrino kaj du sklavoj, kio sumiĝas entute—du homoj.

**INDIGENOJ:** Homoj malmulte valoraj, kiujn oni trovas peste plagantaj en nove trovitaj mondpartoj. Post ne longe ili ne plu plagas la teron; ili fekundigas ĝin per la propraj kadavroj.

**KARTEZIA:** Apartena al Kartezio, aŭtoro de la sentenco, Cogito ergo

sum. (Mi pensas, konsekvence mi ekzistas). La sentenco povus esti plibonigita, eble jene: Cogito cogito ergo sum (Mi pensas, ke mi pensas, konsekvence mi ekzistas). Tio estas tiom proksima al la certeco, kiom ĝis nun atingis kiu ajn filozofo.

**MITOLOGIO:** La entuto de la kredoj de primitiva popolo koncerne ĝian originon, fruan historion, heroojn, diaĵojn k.t.p. Tianome oni distingas ĝin disde la veraj historioj, kiujn tiu popolo poste inventis.

(Laŭ Ambrose Bierce, tradukis F. R. Banham.)

#### VENKA STRATEGIO.

En longa artikolo, tie ĉi resumita s-r Brkiĉ montras al la aŭstralia E-istaro kiel direkti la fortojn per venki. Li diras interalie:

La homoj ne venos al niaj kluboj; ni devas serĉi kaj viziti ilin por ke ili sciigu ke E-o ekzistas. Oni povas tion fari rilate amikojn kaj parencojn, sed tia unuopa agado ne povas multe progresigi nian movadon. Oni devas "ataki" organizojn, sociajn kolektivojn, "fiŝkapti" en 100 div. lokoj.

Kiu prezentas interesan paroladon pri io nova, tiu estas ĉiam ŝatata de aŭskultantaro. Miasperte, bonaj paroloj aŭ publikaj grupoj estas 95%-e nevanaj. Al nur 5% el ili mankas minimume unu nova membro por la kluboj.

Kiel kontakti, modeste, netrude, la ĝustajn grupojn? Oni malŝatas personon, kiu varbas simpatian por si mem. Estas pli bone, ke ili invitu vin paroli pri E-o, ol ke vi mem proponi tiun servon. Kiel do invitemi ĝin? Simpla! Jen la strategio:—

Ekzemple, la Skolta Asocio estas grava junulorganizo. Mi do sciigis la privatan adreson de la prez-o de la loka Sk. As. kaj tiun de la Asocio mem. Mi sendis ilin al "Esperanta Skolta Asocio" kaj petis ĝian sek-ion skribi E-leterojn al la du adresoj en Ballarat, invitante aliĝi al la E-movado pro tia kaj tia kaŭzo. Mi sendis al li resp. kuponojn. Samtempe el Jarlibro mi prenis adresojn de UEA reprezentantoj de Skoltismo, sendante al ili ankaŭ r.kuponojn kun peto skribi al skoltoj en Ballarat. Mi aranĝis, ke la eksterlandaj skoltoj skribu al skoltinoj tie ĉi, kaj eksterl. skoltinoj al ĉi tieaj skoltoj. Mi multoblis

tiom da leteroj, kiom da eksterlandaj gekorespondantoj havis miaj gelnantoj, kaj petis sendi portretojn, Egazetojn, vidajkartojn k.t.p. por stimuli intereson en E-o en Ballarat. Tiel, per miaj gelnantoj, la leteroj iris, kune kun tiuj de ilia propra plumo.

La "atako" al skoltoj estis finita, sed ni devas ataki ankaŭ aliajn. Mi kun aliaj geklubanoj elspezis ĉiu el ni po kelkaj ŝilingoj kaj sendis samajn leterojn al ĉiuj miaj eksterl. kores., petante ilin sendi E-kuriozajojn, afrankitajn kovertojn, k.a. al tiu aŭ alia metodista, katolika, eduka, artmetia instituto, preĝejo, en Ballarat. Atakante certan asocion, ni serĉas la konformajn adresulojn en la div. Egazetoj, por bone direktigi la "kuglojn" al la trafcelo. Rilate al ekleziaj aferoj helpis nin la red. de "Dia Regno", K.E.L.I. kaj Italaj katolikoj. Sume, mi kaj 9 lernantoj skribis 250 leterojn al ĉiaspecaj grupoj, kiuj uzas E-on, petante ilin skribi al la konformaj grupoj en Ballarat, kio kostis al ni iom da mono, tempo kaj cerbenegio.

La peno ne estis vana. Post montato komencis alvenadi E-aj leteroj, broŝuroj, bele afrankitaj vidajkartoj, gazetoj k.t.p. al diversaj grupoj en Ballarat. La Skoltoj ricevis interalie Tutmondan Skoltan Gazeton en E-o, metodistoj metodistan literaturon en E-o, katolikoj la katolan, Y.W.C.A.-anoj leterojn en E-o de siaj samasocianoj en aliaj landoj. Kelkaj alilandaj E-istoj skribis en E-o, laŭ nia sugesto, al loka gazeto kaj radistacio. Ĉie en Ballarat oni parolis pri stranga "lingo" kaj volis kompreni interese kaj bele aspektajn senditaĵojn el ĉiuj mondpartoj.

Nun venas la plej grava afero! Antaŭ ol vi kontaktis ilin (aŭ ili vin) ili estis jam konvinkitaj, ke E-o, ampleksa tutmonda movado, ja vere ekzistas, kaj ke homoj de tre diversaj grupoj efektive kaj efike ĝin uzas. Tiel ni preparu la grundon. Poste, kiam vi parolados al ili pri E-o, kelkaj jam atendos vin por defendi E-on, kelkaj deziros akcepti ĝin "per ambaŭ manoj."

Vi ĉiuj povas tion fari se vi havas nur eĉ malpli ol dek membrojn en via klubo, kaj se vi pacience serĉas adresojn en la E-a presajaro por fari trafikajn kontaktojn.

Atendante venon de la unuaj sendaĵoj, mi faris ekspozicieron, kiun mi prenis ĉien en pakajo. En ĝi:— Jarlibro de UEA, "Esperanto," "Heroldo", "Dia Regno", katolika, laborisma, skolto gazeto, "Rondo", "Internacia Kulturo", ŝlosilo por Angloj, Biblio E-a, Hamleto, impresaj poŝtmarkoj, bele afrank. kovertoj, unuvorte io por ĉiu gusto!

Kiam la sendaĵoj venis, diversaj organizoj perpersone aŭ -letere min invitis, ĉiam samcele: klarigi al koncerna grupo ĉion pri E-o. Nia E-a klubo vizitis ilin, montris ĉion, kion ni preparis por montrado, kaj parolis pri-Espe. Nature, ni parolis plej multe pri tio kio estas la emo de koncerna grupo, kaj por ĉio dirita ni montris pruvojn. Ni kontentigis katolikojn samkiel protestantojn, socialistojn samkiel "malsocialistojn." Ni vizitis pli ol 25 grupojn, kaj multaj atendas nin senpacience. Post ĉiu vizito minimume unu persono aliĝis al nia klubo.

Tiamaniere ni ricevis en 5 monatoj preskaŭ 50 novajn anojn. Se oni konsideras, ke en Ballarat la homoj kiuj vere parolas E-on estas nombre malpli ol la fingroj de mano, oni povas kompreni, kial ni ne havas nun 200 membrojn.

Ni parolis ĝis nun al pli ol 2000 personoj pri E-o kaj granda parto ekinteresiĝis vigle. Se ni havas en Ballarat tiom da E-parolantoj kiom havas grandurbaj kluboj nia membraro estus multe pli granda, ĉar ni havas pli da instruantoj. Uzante niajn metodojn, oni certe povus ege disvastigi nian aferon en Aŭstralio. La kluboj ĝis nun ne agadis aktive por E-o ekster la klubo, sed nur "vivetis" dum internklubaj renkontoj, kun eble unu kurseto. Venu al klubo por ripoziti, sed laboru ekstere, ĉar tie estas la homoj, kiuj alportos venkon al E-o! Iru, ĉar ili atendas vin!

—D. Brkiĉ.

## LA FORUMO.

"Spite la majuskloj de s-r Koppel, ni havas lernantojn; kaj ne unufoje ĉi-jare, malgraŭ la terura vetero, havis kunvenon tiel malgrandan kiel li diris", Rondo p. 288.

—E. W. Chandler (Sydney E-Soc).

## AŬSTRALIA KRONIKO.

**Sydney:** Nia laboro por enkonduki E-on en la lernejojn daŭre kreskas. "Valley of Trees", la jurnaleta de Chatswood Central School, aperis en speciala eldono por "Children's Book Week" kaj en speciala kuŭveno por la gepatroj oni anoncis ke ĝi iras pere de E-o al pli ol 20 aliaj landoj. La Inspektoro multe interesiĝas kaj la jurnaleta kun E-klarigo jam fariĝis oficiala parto de la lerneja programo.

S-ro Kevin Smith enkondukis la gazeteton "Klerigo" de la Aŭstralia E-societo de Instruistoj en la Instruistana Kolegion en Sidnejo, kie ĝi elvokis multe da intereso.

Aranĝojn kun aliaj societoj kaj organizoj por interŝanĝo de vizitoj ni komencis fari kaj la unuan de oktobro ni donos programon pri E-o ĉe la "Fellowship of Australian Writers". Aliaj vizitoj al kulturaj societoj kaj sindikatoj sekvas.

Vizitis nin s-ro Kester Berwick, kiu estras E-grupon en Newcastle. Ni aranĝis intiman kunlaboradon kun la Newcastle-grupo kaj vizitojn inter la membroj. Newcastle-grupo uzos nian bibliotekon kaj eble en la printempo ni ekskursos kune en la bela kamparo inter la du urboj. —E. W. Chandler.

**Perth:** Kun granda ĝojo ni sukcesis organizi novan elementan kurson por infanoj. S-ro S. Hicks estas la instruisto kaj la lecionoj okazas dum sabataj matenoj en nia Ligĉambro.

La Junula Fako de la Laborista Partio enketis pri E-o kaj ni delegis Liganon f-no E. Ball por konduki la lecionojn.

Vespere, 14 Sept. ni disdonas atestojn al 10 studentoj kiuj sukcese partoprenis ekzamenojn en la unugrada kurso de s-ro Pollard. Dum la same vespero ni ankaŭ honoros D-ron Caldera, kiu gajnis la "Masel-Premion" por 1950.

**Ballarat, Vic.:** La Junulara Klubo de St. Peter's Church of England invitis anojn de nia klubo kaj prez. N. Bevan parolis pri la graveco de internacia lingvo. Ankaŭ s-ro Brkiĉ parolis kaj f-no Bouillon legis artikolon pri E-o. Multaj aŭskultantoj interesiĝis kaj esprimis deziron lerni E-on.

Bonvenaj gastoj en Septembro estis ges-roj Holmes el Seymour, kiuj, trapasante nian urbon de libertempo

en la Grampian-montaro, partoprenis amikan vesperon en la hejmo de s-ro Bevan.

**Melbourne:** La plej interesa vespero dum Aŭgusto sendube estis la parolado de D-ro A. Fridenberg "Kiel mi forlasis Latvion" (9 Aug.). Li pentris vivan bildon pri la okazintaĵoj dum la rusa kontraŭofensivo, la disfalo de la germana armeo, la paniko inter la rifugiintoj kaj la bombardado de latvaj urboj, kiam li mirakle savis sian familion sub la tondro de kanonoj. Kant-vespero okazis 23 Aŭgusto, kiam sub gvidado de s-ro H. Hutton ni ekzercis novajn kaj malnovajn kantojn. Pri "Astronomio" parolis, 6 Sept., s-ro McKenzie kaj interese rakontis al ni pri la gigantaj distancoj en la universo. La sukcesa ĉi-jara Germana E-Kongreso en Mainz, biografio de eminenta hungara skulptisto-esperantisto Laszlo Zinner (nun en Sao Paulo) kaj ŝecpoemoj el la plej nova libro de Raymond Schwartz estis la ĉefaj eroj, 13 Sept., de parolado de s-ro H. Koppel en la serio "Tra la Mondo E-ista."

En la aŭgusta kunveno de la Melbourne Rendevuo, s-ro P. Hanks interese rakontis pri vojaĝo kiun ŝi faris lastjare "Tra Norda Kvinlando". Ŝi montris tre belajn lumbildojn pri la birdaro, la floraro kaj la pejzaĝo de tiu ĉi ne multe konata parto de Aŭstralio.

Preparoj por la ĉi-jara Zamenhof-feste bone progresas. La Ballarat E-klubo anoncis aŭtobusan karavanon kaj ĝiaj "verdaĵ aktoroj" partoprenos aktive dum la vespero.—H.K.

**MELBURNA RENDEVUO**  
27-a de Okt., je la 8-a, Henry  
George Club, 18 George Pde.  
S-ro E. McKenzie  
"La Fabrikado de Ledo"

## SINJORINO?

"Li kun sia sinjorino paŝis en la teatron." Pri la diro en Plena Vortaro, ke sinjorino estas ĝentila titolo por edzinigitaj virinoj, oni povas havi alian opinion. Laŭ mi, la vorto "sinjorino" estas por virinoj (kun aŭ sen edzo) la sama titolo de ĝentileco (kp. sub 4 en P.V.) kiel "sinjoro" por viroj kaj ne enhavas en si mem iun aludon pri geedza stato. — Jfb en "Esperanto-Post."

### KIEL "MAN FRIDAY" TROVIS SIN NE BEZONATA.

"Vendredĉjo", diris Robinson Kruso, "kun bedaŭro mi devas informi vin, ke mi ne plu bezonas vin." "Kial ne, mastro?"

"Nu, vi jam scias, ke ankoraŭ restas granda parto de la lastjara rikolto. Vi do ne estas bezonata por planti aŭ rikolti. Vestoj el kaprofelo sufiĉas por mia tuta vivo, kaj mia domo estas en bonega stato kaj ne bezonas ripar-ojn. La ovojn de la kelonioj mi povas mem kolekti, Fakte, ni jam produktis tro da ĉio. Kiam mi denove bezonos vin, mi vin vokos. Ne necesas, ke vi atendu ĉi tie."

"Bone, mastro. Mi plantos por miaj personaj bezonoj, konstruos propran kabanon kaj kolektos nuksojn kaj ovojn sufiĉe por mi mem. Mi bone iros."

"Kiel vi ĉi tion faros, Vendredĉjo?"  
Ĉi tie, sur la insulo."

"Vi ja scias, ke la insulo apartenas al mi. Mi ne povas permesi, ke vi tion faru sen pago de miaj postuloj, alie la posedado havus nenian valoron."

"Mi do konstruos kanoton kaj fiŝkaptos en la oceano. Tio ne estas via posedado."

"Bone. Sed vi ne rajtas fari la kanoton el miaj arboj, aŭ konstrui ĝin sur mia tero, aŭ uzi mian marbordon kiel alterigejon. Vi ankaŭ devas fari vian fiŝkapatadon sufiĉe malproksime, por ke vi ne ofendu kontraŭ miaj marbordaj rajtoj." "Kion mi faru, mastro?"

"Tio estas via problemo. Vi estas liberulo, kaj vi ja scias pri la severa individualismo praktikata ĉi tie."

"Tre verŝajne mi mortos pri malsato, mastro. Ĉu mi povas resti ĉi tie ĝis tio okazos, aŭ ĉu mi devas naĝi ĝis ekster la limoj de via marbordaj rajtoj, kaj aŭ droni aŭ malsatmorti tie?"

"Mi ĵus ekpensis ion, Vendredĉjo. Mi ne volas ĉiutage porti mian rubon al la maro. Vi povas resti por tion fari, kaj se vi trovos inter tio ion manĝeblan, post kiam mia hundo kaj kato sin nutris, tion vi povas manĝi. Vi ja estas bonŝanculo."

"Dankon, mastro. Vi estas vera bonfaremulo."

"Ankoraŭ plua afero, Vendredĉjo. Tiu ĉi insulo estas tro homplena. Kvindek procento el la homoj estas

senlabora. Ni trapasas periodon de severa ekonomia premado, kaj mi ne povas pripensi taŭgan rimedon por solvi la problemon. Neniu krom ĉarlatano dirus, ke li povas. Do estu tre singardema kaj ne permesu, ke iu ajn alteriĝu por kolonii. Se ŝipo venos, ne permesu la malŝarĝon de ia komercaĵo. Mi devas vin ŝirmi kontraŭ fremdula laboro. La ekonomia sistemo estas fundamente perfekta, kaj prosperado atendas nin ĉe la flanken-iĝo de la vojo."

### SIMPATIA.

"Simpatia" does not always mean "sympathetic" in the English sense. New Yorkers whose speech contains a large number of "Continentalisms" are often heard to say: "He is a very sympathetic fellow," by which they mean a person who is likeable, a person who makes one sympathetic to him. When Zamenhof said: "personoj, al kiuj mi pro ia kaŭzo ne estas simpatia," he meant "persons in whom for some reason I do not rouse sympathy." La Plena Vortaro, citing this example, defines the word as "esti-ganta simpatio de iu" and "simpati-inda." The word is confusing to English-speakers. It was no less confusing to a Japanese who recently translated this Zamenhof phrase by "persons with whom I cannot for some reason sympathise."—J.O.

(There are several English senses. Some would render it " . . . with whom I, for some reason, have little in common, don't feel at home with, am ill at ease with, am not congenial with." In addressing a bereaved person, one might say: "Mi kondolencas kun vi," rightly using the Latin derived form to the Greek; or, "Mi estas sincere kortuŝita pro via animdoloro." "He felt sympathy for the poor lad"—Li sentis kortuŝon al la kompatinda knabo. "Sympathy" etymologically means "sentado kun alia," feeling with another. The nature of the feeling may vary.—Editor.)

### DOMAĜI.

"Domaĝi" kaj "domaĝo" apartenas al la ofte miskomprenataj, do misuzataj vortoj, ĉar ne ĉiuj vortaroj donas ĝustajn signifojn. Universala Vortaro (eld. 1907) donas Angle "pity (it is a pity)". Oni ĝenerale uzas nur la for-

mon: Estas domaĝe (estas bedaŭrinde). D-ro Zamenhof, kiu mem komence asignis kelkajn signifojn al la vorto, fine klarigis en 1907: "Domaĝo ne havas la sencan de malprofito. La efektiva senco de la Esp-a 'domaĝi' estas proksimume: ne voli elspezi, ne voli perdi, ne voli difekti." Ekz., li ne volis aĉeti libron, ĉar li domaĝis la prezon (begrudged the price). Li ne eliris en la pluva vetero, ĉar li domaĝis sian veston. Li forkuris de la batalo, ĉar li domaĝis sian vivon, didn't want to risk his life. Foje la senco de "domaĝo" estas tre proksima al tiu de "bedaŭro", ekz. Kia domaĝo! (Kiel bedaŭrinde). "Kia perdo (aŭ difekto), kiun mi ne volus havi!" Jen proverbo de d-ro Zamenhof: Kiu domaĝas groŝon, perdas la tutan poŝon. (Who begrudges a penny loses all he has.) Sekve, ne estas korekte, diri "La hajlo kaŭzis grandan domaĝon." (Laŭ Max Butin en "Esperanto-Post.")

#### LA ARTO OFENDI.

S-ro Daniel Bullen, angla farmisto, 104-jara, ankoraŭ estras la propran bienon. Kiam 100-jara, li diris: "Gi estas ĝuste la laborado, kio tenas min en la vivo. Gi neniam mortigis homon." Poste, liaj familianoj kaŝis lian falĉilon, por fari finon al lia laborado (Manchester Guardian).

Vivien Leigh (vivin lej) mirinde aktoras en rolo, kiu streĉas la kapablojn de eĉ bona aktorino. (R. Smith pri "Tramo nomita Deziro"). Rosalind Russell . . . unu el tiuj filmsteluloj, kiuj povas legi, ne movante la lipojn (Daily Express).

Cirkaŭate de Usonoj oficiroj, Go mortas, kun kuglo en la dorso, kaj en la okuloj rigardesprimo, kiun kuracisto facile rekonas kiel simptonon de stomaka ostroveneno, sed kiun filmamantoj prenas por patriotismo. (Pri "Tokio Joe", Sunday Pictorial.)

Mi ne konsulte serĉis konsilon ĉe advokato, ĉar mia kazo estas tute honesta. (Plendanto antaŭ Londona tribunalo.)

La "Kate" (kejt) de Diana Churchill estas viveca kaj, kiel ĉia aktorado de tiu virino, inteligenta; sed ĝi estus treege pli bona, se ŝi memorus, ke, kiam ŝi ne parolas, la buŝo ĝenerale aspektas pli bela en stato de fermeco. (Sunday Times.)—El "The Strand."

Pri "Enigmoj" en la Junia n-ro mi sentis intereson. Pro nesufiĉa scio, mi ne rajtas juĝi pri la situacio en landoj, kie oni ne favoras E-on. Ankaŭ mi bonvenigus leterojn el Sovetio kaj aliaj landoj. Tamen estas certaj faktoroj, se registaroj malpermesas tiun aŭ alian movadon. Mi volus demandi, kiaj personoj motoras la E-an movadon en orienta Germanujo; se tiaj grupoj konsistis el tiaj homoj, kiajn oni de tempo al tempo trovas en E-aj kluboj en Usono kaj Aŭst-ralio—homoj, kiuj tuj krias "Ruĝulo!" se oni ekparilas pri paco aŭ internacia frateco—se tiaj homoj faris el E-aj grupoj kontraŭ-Sovetaj klaĉoj, tiam eĉ mi devus konsideri, ĉu estas saĝe permesi ilin en organizita formo dum ekzistas malvarma milito. En la unua periodo de la Usona historio, por jaroj "libereco" ne povis ekzisti; kelkaj tute ŝenkulpaj organizoj estis subpremitaj, ĉar ili laŭdis anglan literaturon aŭ studis anglan historion. Persone mi ne amas vidi subpremon de kia ajn speco. Tamen mi volus scii la kaŭzojn de ĉiaspeca subpremo kapitalisma aŭ socialisma antaŭ ol fari juĝon. Via voko al Malik do estas korekta kaj natura.

—Joko.

HISTORIAJA BIBLIOTEKO en Melburno. Por celebri la jarcenton de la Stato Viktorio, nova publika biblioteko—La Latrobe—estos establita en 1951. Gi havas nomon post la guberniestro (1851-4). Gi ĉefe servos kiel konservejo por dokumentoj historiaj de Viktorio, simile al la fama Biblioteko Mitchell (miĉl) en Sidnejo. Por ĝi oni volonte akceptas pentraĵojn, desegnaĵojn, skribaĵojn k.s.

Kiam eĉ la jam kolektiĝinta materialo estas bone katalogita kaj indeksita, ĝi estos tre valora por ĉiu studento de ĉi-landa historio.—C.W.B.

THERE WILL BE one day a world language. When? Sooner or later, according to the good or bad will of men, who, on this as on all great issues, hinder the time of realisation—to their shame; or hasten it—to their glory.—CONCEPCION ARENAL, cited in "Esperanto-Post," Limburg-Lahn.

**A GOOD DEED**

in a naughty world. Here's one of the many acts of service that Esperantists render one another. For relatively small effort they reap enduring dividends. "Prace" and other Czech papers gave it space. Says "Prace" in effect: Some days ago a member of the Esperanto club in Brno urgently needed medicaments for her husband, menaced by cerebral apoplexy; the medicine was not procurable in Czechoslovakia so her club turned to the Esperanto centre in Praha, which by Czech Radio in its daily Esperanto emission sent an appeal to the world.

Within 24 hours came the first consignment of "Rutino," followed by others. One from Poul Thorsen, Bangertsgade 8, Copenhagen, who wrote in Esperanto: From the Esperanto emission on Radio Praha, I learned of your need, and am losing no time in sending you the drug necessary. It is easily procurable here, but the cost is high—some 1200 Czech crowns. That's no matter. It is a pleasure to send it, first in gratitude for the kindness you shew to my wife and me in Czechoslovakia last summer in Praha and Plzen; second, as a small recompense for your esteemed broadcasts over Czech Radio. We listen to them every day and have great pleasure in the positive presentation of life to-day in your brave country . . . Roma and Poul Thorsen. (From "Heroldo de Esperanto," Holland.)

**RONDO (p. 260).**

Malgraŭ grava malsano de sia edzino, Malgraŭ Joab Eljot skribis al ni leteron en kiu li pike puŝas la fingron kontraŭ iaj lingvaj punktoj en la teksto de tiu numero. Li nomas malferta la tradukon en Mateo 16: 15, proponante "Sed kiu, viadire, estas mi?" Lia kontribuo al la landnoma "problemo" konsistas en: (1) lando por Eŭropaj landoj, (2) ujo por la Aziaj, (3) io por la ceteraj. Tio "helpas la poŝtistojn." Ĉu vere? Kiel estus Paragvajo, Afrikio, Peruo, Papuo, Samoio, Amerikio, Usonio pli kompreneblaj por poŝtistoj ol la jam komune uzataj formoj?

La Rondo sincere deziras al s-ino Eljot baldaŭan resaniĝon!

**PAKAJOJ GERMANUJEN.**

La R. p. 288-9. En la pasintaj du jaroj ni sendis plurajn manĝpakojn al E-istoj en du apartaj urboj de la Soveta zono. Ĝis nun ĉiu pakajo sendefekte atingis la celon. Letera korespondado estas tute libera (kompreneble oni skribu diskrete), sed ili ne povas ricevi gazeton aŭ starigi E-grupon. Niaj amikoj skribis lastan monaton, ke ili ne plu malsatmizere suferas kiel antaŭe, sed mankas ankoraŭ sukero, viando kaj graso. Tiu lasta estas la plej severa manko; se iu sendos manĝeblan grason iaspecan, tiu certe ricevos elkoran dankon.

(I. P. Hanks.)

F-n A. Curtis, Burncliff, M.S.10, Bentleigh (Kvinslando) komentas pri la afero. Antaŭ du jaroj ŝi ricevis p.k. de E-isto en la Rusa zono. Respondinte, ŝi ricevis leteron de ĝojo pri tio, ke virino en Aŭstralio bonvolis skribi al Germano—ĉar "la tuta mondo malamas la Germanojn."

Poste li petis, ke ŝi sendu manĝaĵon, por kio li resendus kion li povas—plejmulte pasamento kaj brodaĵo. Ŝi sendis pakajon kaj post longa tempo ricevis leteron de entuziasmo. La graso estis por li ege valora. Per lia freŝdata letero, ŝi sciigis pri la malfaciloj de E-istoj en lia zono. Li havas nur malgrandan lernlibron kaj la volon lerni. Ofte li devis studi ŝian leteron dum tagoj antaŭ ol tute kompreni ĝin.

De tempo al tempo ŝi ricevas pakajeton de sia amiko, kaj li ricevas ankoraŭ unu pakajon, sed ĉiam estas prokrasto kaj dubo dum jaro. Povas esti, ke tio fariĝos pli malbona.

**KONTISTO?**

Tradicie "librottenisto" signifas "kontisto." Tamen ne per si. Laŭ Plena Vortaro librotteno estas biblioteko. Millidge difinas "book-keeper, accountant" per "kontisto"; "book-keeper" per "librottenanto, librottenisto." Edinburĝ per "kontisto, kalkulisto." P.V. havas "kontisto, kontregistristo."

Libroagento ne estas "homo, kiu stoke tenas kvanton da libroj," krom nur derive. Kial forlasi la naturaĵon sencon de "librottenisto" por preni en ĝin nelogikan flankenscon?

**P.257 APRILA N-RO.**

Pro amika letero de P-ro G. Waringhien mi povas korekti kelkajn erarojn en mia recenzo de lia "Leteroj de Zam."

"kulpita" estas korekta (eraro kulpita de X; eraro, kiun kulpis X); Maupertius devas esti Maupertuis (vidu ankaŭ No. 26); "De Beaufront neniam skribis al Zamenhof." Tio signifas, ke De B. neniam skribis al Z. pri la **dezirateco de reformoj**. Male, la korespondado inter ambaŭ estis tre abunda ĝis 1905-6 kaj treege bedaŭra estas ĝia forperdo. Miaj rimarkoj pri Occidental estas ĝustaj, krom pri la aŭtoro de la citita artikolo, kiu estas ne Z. sed De Beaufront.—Red.

**GRATULO** al F-n R. G. Telfer, Medindie Gardens, S. Aŭstralio, kiu gajnis en la skriba parto de la BEA-ekzameno por progresintoj.

**CHILDREN'S WORK.**

After an interesting description of extracurriculum activity in Esperanto at the Lycee Turgot, a modern high school in Paris, by 14-17-year-old youngsters in correspondence with similar children in 23 other countries, Prof. R. Gerard mentions that at two large expositions held during the last two years at the Pedagogical Museum of the French Govt., a public school from a rural area presented exhibits received from Australia—i.e., photos of rare animals, dried plants. The exhibits were accorded general praise, including that of two Inspectors-general of the Ministry of Education. ("American Esp. Mag.")

"PROBLEMOJ", sendependa gazeto, P.O. Box 205, Old Chelsea Station, New York 11, forte atakas maldokstrismon en la E-a movado. Foje ĝiaj komentoj inklina al la histerio. Estas ridinde diri ke komunistoj gvidas foliojn de la Socialisma Laborpartio (Usono) kaj la U.E.A.-on. Honestajn nomojn atakas homo, kies nura diskreto estas—resti anonima.

S-r M. C. Butler eniris kuracejon por operacio en Julio. Liaj multaj amikoj kore deziras al li resaniĝon.

**KORESPONDO.** — S-r Miroslav Tyrala, muzikinstruisto, Salomoŭnova 41, Ostrava 1, Czechoslovakia. S-r L. Unuzov, 37 Tskar, 2a Burgas, Bulgaria.

20-jara Violette Rigaud, 157 rue Dr. Temporal, St. Rambert en Bugey (Ain), France, dez. interŝanĝi poŝtmarkojn kaj leterojn.

Esperanto Kurso, Box 232, Plzen, Czechoslovakia. Bonvolu skribi al mi **THANK YOU!** To 29 Sept.—Mmes. N. Foster 20/-; Hanks 10/-; Hintze 6/-; H. Foyster, Weatherall, J. Purdue, S. Wyres 4/-; Misses I. James 10/-; E. Godfrey 8/-. Messrs Ramsey 22/6; E. Hearne, S. Ling 20/-; E. Hanks, C. Cowling, T. Porter, H. Koppel, Kelk, Linton 10/-; Ottens, Mannerfly 8/-; L. Reid 2/-; Melb. Klubo (kotizo) 6/-; ad. 1/6, Rendezuo ad. 18/-. Sales 21/-.

**KLUBAJ INFORMOJ.**

**MELBOURNE ESPERANTO** CLUB kunvenas ĉe The Henry George Club, 18 George Parade, for de 113 Collins St., Melbourne, je la 8a ĉiumerkrede. Sek-io, S-ro H. M. Cohen, 83 Youngman St., Preston, N.18.

**BALLARAT** Esperanto Club kunvenas ĉiujaŭde je la 8-a ĉe Fidelity Club Rooms (Angulo de Albert kaj Dana Streets) Sek-io S-ro S. Wyres, Victoria Street, Sebastopol, Ballarat.

**SYDNEY ESPERANTO** Society kunvenas ĉe 12 Ennis Rd., Milson's Point (stacidomo) je la 8a ĉiujaŭde. Sek-io, S-ro E. W. Chandler, 57 Northcote St., Crows Nest, N.S.W.

**BRISBANE ESPERANTO** Society kunvenas Room 78, Albert House, King George Square, je la 7.30a la 2a kaj 4an Mardon en ĉiu monato de Februaro ĝis Novembro.

**OKCIDENT - AUSTRALIA ESPERANTO** LIGO kunvenas ĉe Bacton House, 723 Hay St., Perth, je la 2a kaj 4a Jaudo en monato krom Januaro, sekretario, Jack Hawks, 58 Nelsons Crescent, East Perth.

**ADELAIDE W.E.A.** Esperanto-klubo kunvenas ĉiumerkrede je la 8a en la Filozofia Ĉambro de la Universitato. Gvidanto: F-n W. Addis, 25 Greville Ave., Flinders Park, S.A.